

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №4



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №4 (322)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2025

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2024, №4 (322).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 31 декабря 2024 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero.	3
Temo	5
Paweł Fischer-Kotowski. Stela Besenyei-Merger: La Esperantisto de la Jaro 2024.	6
Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2024	7
Paweł Fischer-Kotowski. Oni ĝuu tion, kion la lingvo povas ebligi: Intervjuo kun Stela Besenyei-Merger.	8
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. La dudek-sepa elekto. Kial la lasta?	10
Eventoj	11
Povilas Jegorovas. Litovio: La 2024a jaro finita	12
Ronald Schindler. Zamenhoffesto 2024 en Berlino	14
Spomenka Štimec. Poezioplena Zamenhof-tago en Zagrebo.	16
Raymonde Coquisart. Interasocia Zamenhof-Festo en Parizo	17
John Huang. Toronto gastigos du gravajn eventojn en 2025	18
Choe Taesok. Koreio kaj Japanio komune kongresis	19
Emma Villemin. KAEST revenis al sia naskiĝurbo	21
Martin Thorenz. 73a Kultura Semajnfino en Sarlando.	23
Govanni. La 33a KEKSO: TEJO-volontulo rakontas	24
Utho Maier, Alois Eder. Kjara: Esperanto estas flago de paco, same kiel muziko	25
Choe Taesok. La 18a Internacia Meditado de Ŭonbulismo.	27
Ronald van Buuren. Ludosemajnfino kun Sankta Nikolao en Leauwarden	29
La Esperanta Civito: novaj senato kaj konsulo	30
Manuela Blanco. NaturAmika KulturSemajno	30
Povilas Jegorovas. Memordespero pri Zamenhof en Kaŭno.	31
Irina Gonĉarova. La 18a Moskva lingva festivalo	32
Nikita Valko. Junulara revigliĝo en Belorusio.	34
Gou Xinyue. Kursoj de Esperanto en Ĉinio.	35
Nova estraro de TEJO.	35
Katalin Kováts. Dek du novaj personoj en la Panteono	36
Iĝu instruisto de la jaro!	36
Renovigata la retejo “Esperanto en 12 lecionoj”	37
Szilvási László. Oni haltigos la Esperanto-ekzamenojn en Hungario	38
La kongreso en Brno prokrastita je unu semajno	39
UK-110: Pli ol 600 aliĝintoj el pli ol 50 landoj.	39
Povilas Jegorovas. UEA donis aŭspicion al BET-59	40
Povilas Jegorovas. La Organiza Komitato de BET-59.	41
Novaj datoj de la 81a IJK en Indonezio	43
Aranka Laslo. Instruistoj kongresos en la ĉefurbo de Serbio	44
Ulrich Matthias. Malagasio denove invitas	45
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. István Nemere forpasis	46
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Claude Gacond forpasis.	46
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	47

Tribuno	48
Antanas Visockas. La ekskursia programo de BET-59	49
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, la 10a de decembro 2024	53
Manifesto de Ŝventoj	54
Miora Raveloharison. Dankon pro la helpo	55
Renato Corsetti. KomencOntoj en Eŭropo: ĉi-jare pli bone ol mi timis	56
“Valora” Yang Jinsa. Kiel mi studas kaj vivas en Zaozhuang	57
Kunorganizu la Junularan kongreson en 2026	58
Arkivo	59
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2025.	60
Bo Sandelin. Libereco laŭ John Stuart Mill	63
John Stuart Mill. Pri libereco. Ĉapitro 1. Enkonduko (Tradukis Bo Sandelin)	64
Kulturo	74
Aleksander Korĵenkov. Plena, absoluta kaj sentima sendependeco de la pensado	75
Valentin Katajev. La fusilo. Dimanĉe. La rufaj krucetoj. La aĝoj. La surprizaĝo.	
Patro nia (Tradukis Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, V. S. Neminem, Ludmila Novikova)	77
Paulo Sérgio Viana. La naĝanto	108
Miguel Fernández. Nuntempaj hispanaj poetoj el Kantabrio	111
Poemoj de Marcos Díez, Adela Sainz Abascal, Fernando Abascal, Ana García Negrete, Ángel Sopeña, Miguel Ibáñez, Juan Antonio González (Tono), Yolanda Soler Onís (Tradukis Miguel Fernández)	111
Wolfgang Kirschtein. La saĝeco de la Akademio	120
Carlo Minnaja. Abismoj de la menso kaj de la vivo (Recenzo: Jean Forge. <i>Abismoj</i>) . .	123
Wolfgang Kirschtein. Denseco de genioj (Clemens J. Setz. <i>La abeloj kaj la nevidebla</i>)	126
Paŭlo Moĵajev. Albumeto ne elstara, sed tre plaĉa kaj atentinda (Recenzo: Armel Amiot. <i>Dezertoj</i>)	128
La tria eldono de <i>La Ĉashundo de la Baskerviloj</i>	129
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2024, №50	130
Alessio Giordano. Kompletigi la 55a jarkolekto de <i>Literatura Foiro</i>	131
Filmo pri la 109a UK en Aruŝo.	132
Miguel Gutiérrez Adúriz. La 76aj Belartaj Konkursoj (BK) de UEA	133
“Esperanto ligas homojn”: Rezultoj de la 14a konkurso	134
Mozaiko	135
Stanislav Belov. Pli alte, pli rapide, pli forte	136
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	137
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	138

Kovropaĝe: Maria Kuzina kantas en la ĉina lingvo dum la koncerto de la 18a Moskva lingva festivalo. Ŝi estas diplomita filologo, kaj nun ŝi studas ĉe la Moskva instituto GITIS por iĝi reĝisoro de muzikaloj. (Foto: Maksim Kuzin/ФомоФОПФ)

Temo



Ni sendas niajn gratulojn kaj bondezirojn al Eszter (Stela) Besenyei-Merger (pron.: Béŝenjeĵ-Merĵé), 37-jara denaska esperantistino el Hungario, kiu ricevis la honoran titolon La Esperantisto de la Jaro 2024. Ŝi estas la plej lasta persono kiu ricevis ĉi tiun titolon, kiu estis atribuita 27 fojojn (Andrzej Sochacki fotis ŝin en KAEST-2024).

Stela Besenyei-Merger: La Esperantisto de la Jaro 2024

En 1998 *La Ondo de Esperanto* iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sen-dependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korjenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016), Trezoro Huang Yinbao (2017), Hori Jasuo (2018), Anna Löwenstein (2019), Fernando Maia Jr. (2020), Halina Gorecka (2021), Edmund Grimley Evans (2022) kaj Sun Mingxiao (2023).

En 2024 *La Ondo de Esperanto* okazigis la elektadon de la Esperantisto de la Jaro por la lasta, 27a fojo, do la elektado estis aparte grava. Ĉi-jare 16 kandidatigantoj proponis 19 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis siajn voĉojn:



Eszter (Stela) Besenyei-Merger – 6 voĉoj

Tim Owen, Monika Molnar – po 5 voĉoj

Constantine S. Mashauri – 3 voĉoj

Du kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Eszter (Stela) Besenyei-Merger estas 37-jara denaska esperantistino el Hungario, kiu en 2021 iniciatis la literaturan projekton *Bobelarto*. Ŝi kuraĝigas homojn legi Esperanto-literaturon kaj ankaŭ verki en Esperanto, ekzemple, kadre de MoVeMo (Monda Verk-Monato) aŭ INK (Internacia Novel-Konkurso), en kiu ŝi estas sekretario.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2024 Eszter (Stela) Besenyei-Merger!

Paweł Fischer-Kotowski
sekretario de la elekta komisiono

La elekta komisiono de la Esperantisto de la Jaro 2024

Proponantoj

- Marija Belošević (Kroatio): prezidantino de IKUE
Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto
Renato Corsetti (Britio): akademiano, eksprezidanto de UEA
Albert S. T. Garrido (Filipinoj/Hispanio): ĝenerala sekretario de Filipina Esperanto-Junularo, eksprezidanto de TEJO
Arko Gong Xiaofeng (Ĉinio): estrarano de UEA, eksa vicprezidanto de ILEI
Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB
Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro
Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT
Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto, recenzisto, akademiano
Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro, akademiano
James Rezende Piton (Brazilo): tradukanto, aktivulo de Esperanto-Ligo Filatelista (ELF/AREK), komitatano B de UEA
Sibayama Zyun'iti (Japanio): ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*
Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de *Amikumu*
Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ
Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto
Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libro-servo, komitatano kaj revizoro de ĈEL

Elektantoj

- Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I
Osmo Buller (Finnlando): eksa Ĝenerala Direktoro de UEA
Petr Chrdele (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH
Mireille Grosjean (Svislando): eksprezidanto de ILEI, kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo
Anne Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK
Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*
Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net, eks-akademiano
Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko, akademiano
Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): eksvicprezidanto de UEA, iniciatinto de *Unesko-Kuriero* en Esperanto
Zsófia Kóródy (Germanio): ĉefkunlaboranto de Esperanto-Centro Herzberg, prezidanto de AGEI (germana landa sekcio de ILEI), komitatano C de UEA
Alessandra Madella (Italio): vicprezidanto de ILEI
Ahmad Mamduhi (Irano): prezidanto de ILEI, akademiano
Tim Owen (Britio): direktoro de EAB, akademiano
Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors
Roland Rotsaert (Belgio): estrarano de Internacia Esperanto-Arkivo

Sekretario

Paweł Fischer-Kotowski

Oni ĝuu tion, kion la lingvo povas ebligi

Intervjuo kun Stela Besenyei-Merger

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Mi estis tre surprizita, ĉefe, ĉar nur unu voĉo decidis. Se iu donus sian voĉon ne al mi, sed al Tim Owen, li estus elektita. Ĉiuokaze mi konsideras min la Esperantisto de la jaro nur kun Tim Owen kaj Dorota Rodzianko, kiuj egale, se eĉ ne pli ol mi, meritis la honoron.

Vi estas la lasta Esperantisto de la Jaro, ĉar la konkurso fermiĝas, sed vi estas samtempe la unua... kiu estas denaska parolanto de Esperanto! Kiel denaskaj esperantistoj diferencas de tiuj, kiuj lernis Esperanton poste?

Ne mi estas la unua. Ankaŭ Stefan MacGill estas denaska parolanto de la lingvo, li ricevis la premion en 2016. Denaskaj parolantoj nur tiom malsimilas, ke ili lernis la lingvon iom pli frue ol la aliaj kaj ne pro sia propra interesiĝo ;-)

Junulara renkontiĝo IJS en 1994. La sepjara Stela staras plej supre. (Foto: Andi Ottrok)



Vi kreis Bobelarton, lego- kaj verkoklubon en Esperanto. De kie venis tiu ideo? Ĉu vi okupiĝas pri io simila en la hungara?

La ideo venis malrapide post multe da invitoj de diversaj retaj kluboj por instigi homojn verki por la unua Interkultura Novelo-Konkurso. La unuaj partoprenantoj de la verksesio venis de la konkursantoj. Mi demandis ilin, ĉu estus kelkaj, kiuj volonte partoprenus en formado de reta verkkomunumo. Alvenis manpleno da homoj al la unua verksesio. Poste aliĝis aliaj homoj dum la jaroj kaj monatoj.

Kiujn aktivaĵojn entreprenas Bobelarto? Kiom da homoj partoprenas en ili? Kaj ĉu vi akceptas novajn aliĝojn?

Ni organizas regulajn kunvenojn por verki kaj legi kune. La sesioj okazas en Zoom, bonvenas ĉiu, kiu emas laŭtlegi en Esperanto, emas provi verki aŭ jam estas sperta verkisto. Ni organizas diversajn eventojn rilate al literaturo. Pri ĉio vi povas legi en bobelarto.ink kaj ni ankaŭ publikigas invitojn en Eventa Servo. Se vi volas iom konatiĝi kun Esperanto-literaturo vi tre bonvenas. Kutime estas 6-12 homoj en la diversaj sesioj.

Bobelarto organizis jam ses fojojn MoVeMon (Monda Verk-Monato), interretan aranĝon dum kiu la partoprenantoj ĉiutage verkas kaj diskutas pri siaj verkoj. Kion oni kreas dum MoVeMo? Kaj ĉu la aranĝo celas nur spertulojn?

Dependas de la partoprenanto, kion oni entreprenas dum MoVeMo. Ne estas unu centra verktasko, nur la regulo aktivi ĉiujn 30 tagojn dum la monato. Kelkaj verkis mikronovelon ĉiutage, aliaj tradukis romanon, verkis hajkojn, poemon ĉiutage dum la monato. Ni ankaŭ havas "vorton de la tago", do ofte oni uzas ĝin kiel verkinspiron dum la monato. La defio celas ĉiujn, kiuj volas pliboniĝi je verkado aŭ je la uzo de la lingvo ĝenerale. Ĝi estas malferma por ĉiu.

Kiel vi vidas la estontecon de la Esperanta literaturo?

Se mi pensas pri la agado de EAB, mi pensas, ke ĝi estas brila. Se mi rigardas en alian direkton, mi nur povas pensi, kiom da laboro kaj diversaj taskoj restas por daŭrigi la ekziston de la Esperanto-literaturo.

Ankoraŭ bezonatas iom pli bona maniero eldoni librojn en bita formato por helpi la diskonigon kaj disvastigon de novaj (kaj malnovaj) verkistoj en altkvalita formo. Pli da videoj kaj podcastoj pri literaturo ktp.

Ĉiu laŭreato, ne nur tiu, kiu okupiĝas pri literaturo, respondas la tradician demandon: Kiujn tri librojn en Esperanto vi kunportus al neloĝata insulo?

Plej verŝajne vortaron, la *Fundamenton*, por finfine legi ĝin, kaj *Winnie-la-Pu*, ĉar ĝi estis mia plej ŝatata libro en mia infanaĝo.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Minsko, decembro 2024. La organizantoj de la kampanjo por revigligi la Esperanto-movadon en Belarusio: (de malfekstre) Aleksej Krivcov (Moskvo), Roman Ralko (Moskvo), Nikita Valko (Grodno), Vadim Fedulov (Moskvo). Legu prian artikolon sur la 34a paĝo.

Litovio: La 2024a jaro finita

Daŭras la longa tradicio meze de decembro okazigi kongreson de Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj samtempe aranĝi la tradiciajn Zamenhof-Tagojn. Ĉi-jare la 59a kongreso de LEA okazis la 14an de decembro 2024, kaj la Zamenhof-Tagoj 2024 sekvis la 14-15an de decembro kiel kutime en Kaŭno, jam en la tradicia loko. Al la kongreso venis 80 Litoviaj esperantistoj el ok urboj kaj du gastoj el Latvio.

Post la enkondukaj vortoj de la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas per minuto da silento estis omaĝitaj kvin ĉi-jare forpasintaj elstaraj Litoviaj esperantistoj: Petras Čeliaskas, Zenonas Eimutis Sabalys, Petras Stasiūnas, Bronė Aukštikalnienė kaj leva Švarcaitė.

La jarraporton pri la asocia agado faris Povilas Jegorovas. Li emfazis, ke ĉi tiu jaro por la Litoviaj esperantistoj estis riĉenhava, fruktodona, intensa, kun gravaj atingoj, kvankam malfacila kaj streĉa.

La asocio agis, kiel kutime, laŭ kelkaj ĉefaj direktoj: informado, instruado, eldono, internaciaj ligoj, aranĝoj, junulara agado, internaj organizaj aferoj.

Jam la sepan jaron laŭvice daŭras la unika informa projekto – la migranta ekspozicio pri Ludoviko Zamenhof tra Litovio. Komencita en 2017 okaze de la 100-jara mortodatreveno de la aŭtoro de Esperanto kaj profesie farita fare de Pola instituto en Vilno kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio, la ekspozicio jam estis eksponita en pli ol kvindek Litoviaj urboj kaj distriktoj. Kutime ĝi okazas en publikaj bibliotekoj, kulturaj centroj aŭ lokaj muzeoj. La ekspozicion akompanas vasta informado pri la temo en lokaj gazetoj, novaĵretejoj, radioj kaj televido. Foje okazas solenaj inaŭguroj de ekspozicioj. Ĉi-jare la ekspozicio estis aranĝita en Skuodas, Rietavas, Paĝėgiai kaj Švėkšna. La projekton jam necesas fini, kvankam restas ankoraŭ kelkaj urboj, kie ĝi estonte ankoraŭ povus esti eksponita.

Informado pri Esperanto en Litovia papera kaj reta gazetaro sukcese daŭris. Ni havas bonajn kunlaborajn kontaktojn kun pli ol dek tutlandaj amaskomunikiloj, kie ni konstante publikigas diversajn materialojn pri la agado de Litoviaj esperantistoj. Dum la jaro okazis du gravaj duonhoraj elsendoj de Litova nacia televido pri Esperanto kaj esperantistoj. Okazis ses publikaj prelegoj de Aida Čiĝikaitė en la universitato Vytautas la Granda.

Meze de novembro la Kaŭna juda komunumo kune kun LEA organizis tre sukcesan kunvenon okaze de la 165a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof. Tre sukcesaj estis la printempa kaj aŭtuna kunflugoj de Litoviaj esperantistoj en Antalkiai kun partopreno de Litoviaj gravuloj kaj kun tre riĉa programo.

Se temas pri eldono, ni sukcesis eldoni dulingve tre gravan libron “La blindulo, kiu surprizis la mondon. Vasilij Jeroŝenko” de prof. Vytautas Gudonis pri la fama blinda esperantisto Vasilij Jeroŝenko. Ĝi estis prezentita dum la printempa kunflugo. Pri ĝia apero estis publikaĵoj en pli ol dek gazetoj, novaĵretejoj, revuoj. En la vico estas ankoraŭ kelkaj libroj.

La instruado de Esperanto, kvankam ne tre abunde, ankaŭ okazas en Vilno, Kaŭno, Panevėžys, Šiauliai. El la internacia agado necesus mencii aktivan partoprenon de Litoviaj esperantistoj en BET-58 en Tartu, en la festivalo ARKONES (Poznano, Pollando), en diversaj esperantistaj renkontiĝoj en Germanio, Pollando, Svislando, Francio, Koreio, Hispanio.

Laimundas Abromas el Jurbarkas publikigis siajn prozaĵojn en “Beletra Edeno”, “La Ondo de Esperanto”, “Ora Ĵurnalo”, “Penseo”, kaj gajnis premion en literatura konkurso en Bulgario.

Artikoloj kaj fotoj pri la agado de Litoviaj esperantistoj ofte aperas en la novaĵ-retejo “La Ondo de Esperanto” kaj en ĉiu numero de la samtitola gazeto.

Ses litovaj esperantistoj partoprenis en la 5a Virtuala Kongreso de Esperanto. Junularo en la apudmara urbo Šventoji okazigis la 80an Internacian Junularan Kongreson, en kiu partoprenis pli ol 200 junaj esperantistoj el multaj landoj.

En Litovio tre bone funkcias la interna informado. Konstante funkcias tri informkanaloj. La retejo de LEA funkcias ekde 1996, la dissendolisto de Litoviaj esperantistoj funkcias ekde 2000. La Facebook-paĝo de LEA ekfunkciis en 2014. La Informoj estas aktualigataj ĉiutage – kutime tage aperas kelkaj novaj informoj. Ŝajnas, ke tiu informado estas la plej bona en la mondo.

La 5-13an de julio 2025 en Kaŭno okazos la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59). La organizanto de BET-59 estas ne nur Litova Esperanto-Asocio, sed ankaŭ la universitato Vytautas la Granda kaj la Monda Centro de Litovoj. La preparlaboro por BET-59 okazas tre intense kaj sukcese. Ni atendas ĉirkaŭ 500 esperantistojn el 35-40 landoj. La informoj pri la preparado de BET-59 konstante aperas en “La



Foto: Gražydas Jurgelevičius

Ondo de Esperanto” (<https://sezonoj.ru/bet/>) kaj en la retejo de BET-59 (<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59>).

Aperis la ideo organizi en Kaŭno la 113an Universalan Kongreson de Esperanto en 2028. Ni decidis, ĉu proponi tion al UEA, post UK-110 en Brno.

Fine de la kongreso Povilas Jegorovas enmanigis dankfoliojn al ĉi-jaraj jubileuloj. Sekvis komuna fotado.

Post la tagmanĝa paŭzo komenciĝis Zamenhof-Tagoj 2024. Vytautas Ŝilas prelegis pri la kvin plej gravaj lokoj por Esperanto-movado en Kaŭno. La prezidanto de LEJO Aušrinė Tamošiūnaitė rakontis siajn impresojn pri la 80a IJK en Ŝventoji. Gražina Opulskienė interese konatigis ĉiujn kun la Esperanto-Kastelo Greziljono, Francio. Vespere la kantisto Egidijus Kasputis prezentis dupartan ĉarman koncerton, dum kiu sonis klasikaj kaj nuntempaj popularaj kantoj.

La sekvan tagon (dimanĉe) estis organizita ekskurso al la literatura muzeo de Maironis.

Dum ambaŭ aranĝoj funkciis riĉa libroservo. Eblis aliĝi al la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Tion faris 20 Litoviaj esperantistoj kaj du latvoj. Entute al BET-59 jam aliĝis 101 esperantistoj el 20 landoj.

Povilas Jegorovas

Zamenhoffesto 2024 en Berlino

Tradicie la esperantistoj el Berlino kaj Brandenburgio invitis al Zamenhoffesto, kiu okazis la 30an de novembro 2024, denove sufiĉe frue, sed la koncerna klubejo de la distrikto Berlin-Lichtenberg, kiu nomiĝas Kiezspinne (“kvartala araneo”) ne kapablis disponigi al ni alian daton. Ĉi-jare ankaŭ necesis aranĝi samtage la ĉefan jarkunvenon de la Esperanto-Ligo Berlino-Brandenburgio (ELBB). Rapide ni sekvis la regularon kaj finfine la malnova estraro fariĝis la nova. Ni sukcesis fini la necesan kunvenon preskaŭ ĝustatempe.

Ĉirkaŭ 30 personoj partoprenis la Zamenhoffeston de 2024. Ĉi-foje kvin gesamideanoj el Szczecin trovis la vojon al Berlino, same tri el Magdeburgo. Plej multaj partoprenantoj venis el Berlino, sed ankaŭ Brandenburgio estis reprezentita.

La festo komenciĝis per interesa prelego de Gabriel Berger, kiu raportis pri sia avo, kiu havis personajn kontaktojn al d-ro Ludoviko Zamenhof en Varsovio, ĉar li estis la kutima okulkuracisto de la familio siatempe. La prelego okazis en la germana lingvo, sed Ulrich Brandenburg lerte tradukis por la negermanaj ĉeestantoj. Temis pri tre kortuŝa prelego, pri grava historiaĵo.

Sekvis pluraj interesaj programeroj. Apud piano-akompanado de Hans Moser, ankaŭ estis prezentita la libraro de Helga Plötner, kiu dum pluraj jaroj desegnas portretojn de elstaraj esperantistoj tutmonde. La libraro nomiĝas “Esperanto por mi”, kaj ĵus eldoniĝis la 7a volumo. La oka volumo estas en preparo. Tiun verkon prezentis tri geesperantistoj el Berlino. Fritz Wollenberg ankaŭ sukcesis paroli pri

sia plej nova libro, kiu okupiĝas pri la 100 okazintaj Esperanto-kongresoj de Germana Esperanto-Asocio. Nova programero fariĝis aŭkcio pri diversaj Esperantaĵoj por plibonigi la kasan staton de ELBB. Peter Kühnel elokvente ofertis la aŭkciaĵojn. Multaj aferoj ŝanĝis la posedanton kaj naĝigis tiun aŭ jenan eŭron en la asocian kason.

Benia, Halina, Jasia, Ela el Szczecin invitis al komuna kantado “Pluku ne la florojn belajn”. Margarete Bastian prezentis tri diversajn kantojn, parte en diversaj kostumoj laŭ la enhavo de la kanto. Krzysztof Łobacz el Szczecin tre bone prezentis fantazian rakonton “Du pentristoj”. Temis pri du nekutimaj pentraĵoj.

Bedaŭrinde kelkaj programeroj ne okazis, ĉar la necesa tekniko de la salono ial ne funkciis. La geamikoj, kiuj dependis de la teknika ekipaĵo kompreneble malĝojis pri tiu situacio post longa preparado de siaj planitaj prezentaĵoj.

La tradicia libroservo de Johano Pachter dum la tuta tempo ofertis senkostajn librojn por kolektemuloj.

Ankaŭ la kutimaj frandaĵoj ne mankis. Pro malesto de homforto en la kluboj pro malsaniĝoj la partoprenantoj devis preni varmajn trinkaĵojn de la kuireja ĝiĉeto, kiu funkciis bonŝance.

Fina programero estis propono de Detlef Hofmann, kiu ofertis komunan vojaĝon al la sekvonta Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazos en la jaro 2025 en la ĉeĥa urbo Brno. Li prezentis diversajn versiojn de la al- kaj revojaĝo.

Jam ni mendis la salonon por la sekvonta Zamenhoffesto, kiu cetere okazos la 13an de decembro 2025. Jam notu la daton por certigi vian partoprenon!

Ronald Schindler

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



De maldekstre: Frederick Brütting, Kjara kaj Andreas Emmerich (Foto: Gerold Busch, Aalen)

Kjara: Esperanto estas flago de paco, same kiel muziko

La 26an de oktobro 2024 en la urbodomo de Aalen (Germanio) Chiara Raggi el Rimini, konata en Esperantujo kiel Kjara, ricevis la 18an Alenan Kulturpremion de la FAME-Fondaĵo kaj la urbo Aalen. La pli ol 60 partoprenantoj en la solenaĵo spertis kortuŝan festenon, dum kiu Kjara kantis memverkitajn Esperantajn kantojn kun akompano de propra virtuoza gitarludado.

Urbestro Frederick Brütting donis la tonon en sia bonveniga parolado. Tio sentebliis dum la tuta festo: la baza temo de dankemo kaj vivĝojo, kiuj venas el la fundamenta decido por internacia interkompreniĝo kaj amikeco inter homoj el diversaj kulturoj.

Li eĉ citis (en traduko germana) la vortojn de Zamenhofo: “La interna ideo de Esperanto ... estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton”.

Tion la Esperanto-publiko facile rekonis kiel parton de lia parolado dum la 8a UK en Krakovo en 1912.

Fine la urbestro citis el la statuto de FAME: “1. Ĝi stimulas la internacian komprenon, forigas miskomprenojn kaj reduktas antaŭjuĝojn. 2. Ĝi vekas komprenon kaj toleremon por la konduto kaj intereso de aliuloj. 3. Kreas senton de respondeco por tutmonda komunumo trans la nivelo loka”.

Muzikaj pecoj de la Alena duopo Zwiepack (saksofono kaj kontrabaso) strukturis la festadon. Eksonis la (viva) vojaĝo de du homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj (du malsamaj instrumentoj), kiuj havas multon por diri unu al la alia en konversacio, kun unu parolanta kaj la alia aŭskultanta kaj poste inverse. Simbolo por la kultura interŝanĝo de spertoj en la komuna Esperanto-kulturo.

Al tiu distingita ceremonio Kjara venis kun sia edzo Niccolò kaj la novnaskita (antaŭ 29 tagoj) filineto Olimpia.

D-ro Ulrich Matthias en sia omaĝo rakontis, kiel komenciĝis en Italujo la pandemio kaj disvastigis la teruron de elirmalpermesoj ĉie. Tiam Kjara per sia mirinda voĉo kaj siaj kortuŝaj kantoj komencis konsoli kaj kuraĝigi homojn en ilia soleco. Ŝi alportis lumon de ĝojo en la mallumon de la izoliteco de la enŝlositaj homoj. Kun la mesaĝo de paco en siaj Esperantaj kantoj al homoj bezonantaj konsolon ŝi disvastigis kuraĝon vivi ankaŭ trans la limoj de Italujo, kaj sekve ŝi maturiĝis kiel artisto kaj fariĝis vaste konata.

La premion transdonis la urbestro de Aalen Frederick Brütting kaj la prezidanto de FAME Andreas Emmerich.

Kjara dankis al FAME, al siaj subtenantoj kaj al aliaj, dirante: “Esperanto ŝanĝis mian vivon. Renkonti la lingvon Esperanto estas unu el la plej belaj aferoj, kiuj okazis al mi. Estas privilegio povi kunigi la universalan lingvon de muziko kun la universala lingvo, kiu alportas pacon inter la popoloj. Ni bezonas pozitivajn mesaĝojn, ni bezonas pacon, ni devas paroli kaj kompreni unu la alian. Ni devas senti nin parto de la sama mondo. Esperanto estas flago de paco, same kiel muziko. Mi daŭre kantas miajn kantojn en Esperanto, mi daŭre kantas pri amo, amikeco, homa fragileco por ĉiuj, kiuj havas orelojn kaj koron por aŭskulti. Mi (kaj ni ĉiuj) danku al nia majstro Zamenhof, kiu genie kreis la internacian lingvon kaj proponis al la homaro sian idearon de homaranismo ... Fina sed tre grava danko estas al la esperantista publiko kaj al la publiko, kiu sekvas min dum jaroj pro la korinklino, subteno kaj aŭskultado, kiun ili dediĉas al mi kaj mia muziko. Vi estas la kialo, ke mi faras ĉion ĉi”.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La 18a Moskva lingva festivalo

La 1an de decembro la fakultato pri neprecizaj sciencoj de la Supera Lernejo de Ekonomiko gastigis la 18an Moskvan lingvan festivalon, ĉiujare organizatan de la Moskva Esperanto-Asocio MASI, lingvistoj kaj entuziasmoj de la lingvofestivala movado.

Pli ol 650 personoj ĉeestis la festivalon, sen kalkuli la organizantojn, volontulojn kaj prezentantojn. De la 11a ĝis la 20a horo en ĉirkaŭ 30 universitataj ejoj bolis vigla kaj inspirplena vivo.

Sukcese okazis pli ol 150 prezentoj de 115 prelegantoj. Al la aŭskultantoj estis proponitaj rakontoj pri 73 lingvoj, 42 prelegoj pri lingvistiko, 18 raportoj pri praktika uzo de lingvoj, 15 agadoj en la Infana Spaco, du lingvaj koncertoj kaj tradicia kutima gustumado de ĉinaj teoj. La plej granda nombro da programeroj, nome naŭ, estis ligita kun la ĉina lingvo. Unuafoje Esperanto restis en la dua loko laŭ la nombro de la prezentoj – nur ses.

Tradicie, ĉiuj prelegoj pri Esperanto okazis en la sama klasĉambro (krom la agado en la Infana Spaco). Ĉi-foje junaj Moskvaj esperantistoj Petro Fedosov kaj Roman Ralko parolis pri Esperanto kiel lingvo, ilia samideano Vadim Fedulov prezentis prelegon “Esperanto kaj artefarita intelekto”, membro de la Akademio de Esperanto Nikolao Gudskov proponis du raportojn: “Esperanto kiel poezia lingvo” kaj “Kiel kaj per kio vivas la lingvo Esperanto”, kaj en la "Infana Spaco" Irina

Fine de l' festivalo la prezentantoj kaj organizantoj montris sin (Foto: Maksim Kuzin/ФотоФОНФ)





La plej junaj festivalanoj ne enuis; por ili estis aranĝita riĉprograma “Infana spaco”, en kiu ili, interalie, lernis fari picon el ... papero (Foto: Irina Gonĉarova)

Gonĉarova, helpata de sia 13-jara lernantino Anastasija Maliŝeva, gvidis la metiĝojn “Kiel surskribi kaj aranĝi poŝtkarton en Esperanto”.

Multaj Moskvaj esperantistoj kontribuis al la programo kiel prelegantoj pri aliaj lingvoj, iom da esperantistoj estis ankaŭ inter la gastoj. Kiel ĉiam, la varma, amika kaj ĝojplena etoso de la festivalo estis trapenetrita de la Esperanta etoso.

La festivalo finiĝis per bonega koncerto de la lingvoprezentantoj. Post la adiaŭa himno de la esperantistoj “Ni renkontiĝos...” ĉiuj dezirantoj estis invititaj sur la scenojn por grupa foto kun la organizantoj kaj programkontribuantoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

UEA donis aŭspicion al BET-59

La 4an de novembro 2024 la Estraro de UEA donis sian aŭspicion al la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos la 5-13an de julio 2025 en la Litovia urbo Kaŭno. Per tio UEA esprimas sian apogon al grava internacia renkontiĝo, kies okazigo konsiderinde servas la celojn de la Asocio.

La aŭspicio de UEA estas kvazaŭ "signo de kvalito" de la aŭspiciata aranĝo. Per sia aŭspicio UEA agnoskas, ke ĝi estas prestiĝa kaj altnivela. Kutime estas aŭspiciataj nur la internaciaj esperantistaj aranĝoj kun longa tradicio. Karakteriza estas la opinio pri BET de la eksa estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj Orlando E. Raola: "Kiel partopreninto en la lasta okazo kiam BET okazis ĉeeste (BET-55, Panevėžys, 2019), mi plej forte subtenas la proponon aŭspicii tiun ĉi aranĝon. Ĝi estis tiam ege bone organizita, la programo estis riĉega kaj tre varia, kaj ĝenerale la etoso kreita estis unu el la plej aŭtentike Esperantaj kiujn mi partoprenis dum pli ol 35 jaroj da esperantumado". UEA ankaŭ pretas helpi reklami BET-59 laŭ siaj informkanaloj.

BET estas unu el la plej popularaj tradiciaj internaciaj renkontiĝoj en Esperantujo. La tradicio de BET naskiĝis kiel Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro en 1959 kaj daŭras ekde tiam ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio, escepte de tri paŭzoj. Komence la partoprenantoj venis el la baltaj respublikoj, sed baldaŭ BET komencis altiri esperantistojn el la tuta Sovetunio. Post la resendependiĝo de la baltaj ŝtatoj BET evoluis al vere internacia tuteŭropa kaj pli vasta renkontiĝo kun riĉa programo. La organizantoj atendas, ke al BET-59 aliĝos pli ol 500 esperantistoj el pli ol tridek landoj.

Menciindas, ke UEA donis sian aŭspicion al la kvin pli fruaj BEToj, kiuj okazis en Litovio, nome: BET-46 en Visaginas (2010), BET-49 en Utena (2013), BET-52 en Birštonas (2016), BET-55 en Panevėžys (2019) kaj BET-56 (2022) en Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio (LEA) invitis al BET-59 la tutan Estraron kaj la Ĝeneralan Direktoron de UEA. Jam estas klare, ke en BET-59 partoprenos vicprezidanto de UEA prof. Amri Wandel kaj eventuale kelkaj aliaj estraranoj. En BET-56 en Klaipėda (2022) la unuan fojon en historio de BEToj partoprenis funkcia prezidanto de UEA prof. Duncan Charters.

Povilas Jegorovas



**La 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj
okazos en Kaŭno (Litovio) la 5-13an de julio 2025.
Legu pliajn informojn ĉe <https://sezonoj.ru/bet/>**

La Organiza Komitato de BET-59

Definitiviĝis la konsisto de la organiza komitato (OK) de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos la 5-13an de julio 2025 en la Litovia urbo Kaŭno. La OK de BET-59 estas tre reprezenta. Dum multaj jaroj Litova Esperanto-Asocio (LEA) strebas agi malferme al la ĝenerala socio kaj aligas al sia agado eksterajn reprezentantojn, aŭ realigas komunajn projektojn kun aliaj organizaĵoj. Jam en la Loka Komitato de la 90a Universala Kongreso de Esperanto (Vilno, 2005) estis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ reprezentantoj de ekstero. La perfekte sukcesinta Unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Jurnalisto (Vilno, 2008) estis organizita de LEA kune kun Litovia Ĵurnalista Asocio kaj en ĝia organiza komitato estis kvar reprezentantoj de tiu asocio.

Ankaŭ en la organizado de kelkaj lastatempaj Litoviaj BEToj partoprenis eksteruloj – ekzemple, en la OK de BET-49 (Utena, 2013) estis ses reprezentantoj de la urbo, kaj en la OK de BET-52 (Birŝtonas, 2016) estis kvin funkciuloj de la urbo Birŝtonas, en la OK de BET-55 en Panevėžys en 2019 estis kvar reprezentantoj de la urba municipo kaj en la OK de BET-56 en Klaipėda en 2022 estis kvin reprezentantoj de la urba administracio kaj de la universitato.

En la OK de BET-59 membras la vicrektoro pri komunikado de la universitato dr. Vilma Bijeikienė, la direktorino de la Instituto pri fremdaj lingvoj de la universitato dr. Teresė Ringailienė, la estrino de la kultura fako de la urba administracio Agnė Augonė, la direktoro de la Monda Centro de Litovoj Valdas Kubilius, aliaj funkciuloj. Tiamaniere la organizado de BET-59 fariĝas afero ne nur de LEA, sed ankaŭ de la urbo Kaŭno, de la universitato Vytautas La Granda kaj de Monda Centro de Litovoj. Tia kunlaboro ĉiam donas multe pli bonan rezulton, ol se la organizadon prizorgus nur esperantistoj. Per tiaspeca agado LEA provas solvi ĉiaman problemon de la esperantista agado – la fermitecon.

Krome, en la OK estas ne nur Litoviaj esperantistoj – en ĝi jam dum kelkaj monatoj aktive laboras la Ruslanda verkisto kaj ĵurnalisto, redaktoro de “La Ondo de Esperanto” Aleksander Korĵenkov – tio garantias konstantan kaj bonkvalitan informan priservadon de BET-59 antaŭ, dum kaj post ĝi. En la OK membras ankaŭ multaj konataj Litoviaj esperantistoj. Sube estas la plena listo de la organiza komitato de BET-59.

Povilas Jegorovas: prezidanto, kunordigo, ĝenerala gvidado, informado

Dr. Vilma Bijeikienė: vicrektoro pri komunikado de la universitato Vytautas La Granda

Dr. Teresė Ringailienė: direktorino de la Instituto pri fremdaj lingvoj de la universitato

Valdas Kubilius: direktoro de la Monda Centro de litovoj

Agnė Augonė: estrino de la kultura fako de la urba administracio de Kaŭno

Asta Nastaravičiūtė: respondeca sekretario de Litova Esperanto-Asocio

Aida Čižikaitė: prelegserio pri la litovaj lingvo kaj kulturo
Gražina Opulskienė: instruado de Esperanto
Dalia Pileckienė: kultura programo
Aušrinė Tamošiūnaitė: junulara programo
Ada Navickienė: administrado de la kongresejo
Virginija Jokubkaitė: arta aranĝado de BET-59
Vladimiras Beresniovas: artaj aferoj
Aleksander Korĵenkov: informado pri BET-59
Taesok Choe: retejo de BET-59, ĉiutaga gazeto de BET-59
Irena Jagminaitė: libroservo, financoj
Antanas Visockas: ekskursoj
Gražvydas Jurgelevičius: fotoservo
Jolanta Bulotė: registrado, informado
Olga Strojeva: registrado, informado
Vera Valentaitė: registrado, informado
Vita Petronytė: registrado, informado
Inesa Balaikienė: registrado, informado
Jolita Ružauskienė: registrado, informado
Solveiga Sadauskaitė: registrado, informado
Darius Kubilius: mastrumaj kaj teknikaj aferoj
Ramūnas Narbutas: mastrumaj kaj teknikaj aferoj
Sigitas Sidaravičius: mastrumaj kaj teknikaj aferoj

Povilas Jegorovas

prezidanto de Litova Esperanto-Asocio
prezidanto de la organiza komitato de BET-59

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



La partoprenantoj de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos de la 5a ĝis la 13a de julio 2025 en Kaŭno, havos riĉan elekton de ekskursoj, inkluzive de la tuttaga ekskurso al la regiono de Vilkaviškis, dum kiu oni havos la eblon konatiĝi kun la grandbieno Paežeriai, kiu nun funkcias kiel kulturcentro. Legu pli en la sekvaj kvar paĝoj kaj aliĝu al BET-59 (se vi ankoraŭ ne aliĝis).



La ekskursaj programoj de BET-59

En la programo de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos la 5-13an de julio 2025 en Kaŭno (Litovio), estas planitaj kvar duontagaj kaj du tuttagaj ekskursoj. Ĉi-sube estas konciza priskribo de la ekskursaj programoj.

DUONTAGAJ EKSURSOJ

PANORAMOJ DE KAŬNO

Bonvenon al Kaŭno (litove: Kaunas), la urbo de arkitekturo, historio, naturo, personecoj, sonoj, koloroj kaj gustoj. Ĉiuj urboj estas pitoreskaj de alteco de birda flugo. Pro tio ke Kaŭno situas en la valoj de du kunfluantaj riveroj, eblas de la terasoj ĉe la rivero kaj ankaŭ en la terasoj de la famaj konstruaĵoj admiri la urbon desupre.

Komence ni ĝuos de la teraso sur la tegmento de la Kaŭna ĉefdioceza palaco la kunfluan de la du plej grandaj riveroj de Litovio: Nemano (litove: Nemunas) kaj Neris. De la observejo sur la monto Aleksotas la tuta malnova urbo videblas kvazaŭ sur manplato. Kaŭno estas fama pro sia natura diverseco. Kiam ni venos al la Artefarita maro de Kaŭno, ni de la kastelmonto Papiliakalnis ekvidos la maron de Kaŭno kaj la barokan ĉefverkon en la malproksimo – la monaĥejon Pažaislis. Reveninte al la urbo, ni prenos la lifton al la tegmento de la preĝejo de Resurekto de Kristo, kaj ni vidos la urbon el alia angulo, kaj por la fino de la ekskurso, en kafejo, situanta

sur la tegmenta teraso de malnova konstruaĵo, rigardante al la koro de la urbo – la Katedralo – ni trinkos kafon aŭ teon kun deserto.

LA MONAĤEJO DE PAŽAISLIS

Dum ĉi tiu ekskurso ni vizitos la monaĥejon de Pažaislis, konstruitan en la 17a jarcento kaj la preĝejon de la vizito de la Virgulino Maria al Elizabeto, kiuj situas ĉe la Kaŭna maro. Tio estas unu el la plej belaj ensembloj de malfrua baroko en nordorienta Eŭropo. Tiu ĉi ensemblo havis multajn posedantojn, kaj por ĝia fondinto Kristupas Zigmantas Pacas ĝi estis loko netuŝita de civilizacio, kie oni kreas la iluzion de paco kaj disiĝo de la mondo. La familio Pacas estas fama kaj influa familio, kiu lasis la rimarkeblajn spurojn en la historio de Litovio.

La monaĥejo havas jam pli ol tricent-jaran historion, ĉirkaŭplektita per legendoj, ĝi estas fascina pro sia unika baroka aspekto kaj kolorplena ĉirkaŭaĵo.

Nuntempe, monaĥinoj de la Kazimira ordeno loĝas en la monaĥejo, parto de la monaĥejo estas luigita al la restoracio kaj hotelo. Ĉiujare sur la teritorio de la monaĥejo okazas la fama muzika festivalo de Pažaislis.

LA ENSEMBLO DE LA PALACO RAUDONDVARIS

Monumento de la litova renesanca arkitekturo de la 17a jarcento situas apud Kaŭno, sur la supra teraso de la dekstra bordo de la rivero Nevėžis, proksime al



La monaĥejo de Pažaislis

la kunfluo de Nevėžis kaj Nemano. La palaco kune kun du oficejaj konstruaĵoj, oranĝerio, ĉevalejoj kaj glaciaĵejo situantaj sur la parka areo (3,8 ha), formas unuecan grandbienenan ensemblon. Dum la teatrigita ekskurso, danke al la sinjorino de la Renesanco, ni ekkonos la historion de la grandbieno kaj de ĝiaj plej elstaraj posedantoj. Ni konatiĝos kun la fama amhistorio de Barbora Radvilaitė (Barbara Radziwiłłówna) kaj grandduko Žygimantas Aŭgustas (Zygmunt II August), kaj kiel ili rilatis al ĉi tiu bieno. En la fino de la ekskurso ni estos invititaj al la plej luksa salonego de la grandbieno – la Blanka Gastoĉambro kiu memoras bankedojn kaj muzikon de orkestro de la grafo, kie ni lernetos la paŝojn de renesancaj dancoj.

LA PADOJ DE ANĜELOJ

Se vi volas eksenti vin en nekutima mondo, ni invitas vin iri al la muzeo de la fama litova pentristo kaj komponisto Mikalojus Konstantinas Čiurlionis, kie ni surmetos okulvitrojn de virtuala realeco kaj vojaĝos en la “Padoj de Anĝeloj” tra la magia mondo de Čiurlionis.

La artistoj Kristina Buožytė, Vitalijus Žukas kaj Mindaugas Urbaitis kreis la unikan sperton, kie la videbla mondo de Čiurlionis unuiĝas kun muziko kaj kun 60 bildoj kaj fragmentoj de la bildoj. En la virtuala spaco unuiĝas muziko kaj pentraĵoj, tio rekreas harmonian mondon, kiun, danke al virtuala realeco, ni povos sperti de interne. Dum 20 minutoj de la filmo la medio reagis al la rigardo de la spektanto – la rakontanto tiel gvidas nin tra la “Padoj de Anĝeloj” montrante simbolojn, permesante al ni mem sperti kaj travivi la vojaĝon.

TUTTAGAJ EKSURSOJ

REGIONO VILKAVIŠKIS, KIE ESPERANTA GLACIAĴO ESTAS PRODUKTATA


La regiono Vilkaŭiškis situas ĉe la landlimo kun Pollando kaj Kaliningrada regiono de Ruslando. Survoje al la regiono de Sūduva, kiu famas pro la entreprenemo de la loĝantaj tie suvalkianoj, ni haltos ĉe unu el ses naturaj rezervejoj de Litovio – la biosfera rezervejo Žuvintas, kiu troviĝas en la plej granda marĉo en Litovio. En 2011 ĉi tiu rezervejo estis inkluzivita en la tutmondan reton de biosferaj rezervejoj ĉe Unesko. Multaj birdoj nestas ĉi tie, oni observis ĝis 231 speciojn de birdoj, estis trovitaj 239 specioj de fungoj, estas registritaj ĉirkaŭ 2000 specioj de insektoj, ktp. Dum la ekskurso ni vizitos la informcentron, promenos sur 500-metra natura vojo.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 165 jaroj, en 1859 aperis la libro *Pri libereco* de John Stuart Mill (1806-1873), angla filozofo, ekonomikisto, sociologo kaj politikisto, konsiderata kiel la plej influa liberalisto kaj kiel la plej grava angla filozofo de la 19a jarcento. Ni proponas legi la unuan ĉapitron de *Pri libereco*, kiun speciale por “La Ondo” tradukis Bo Sandelin. (Portreto de G. F. Watts, 1873)

Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2025

1. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Isaj Dratwer** (1905-1918-1985), juda bakteriologo kaj esperantisto, loĝinta en Ruslando, Pollando kaj Israelo; fondinto (1933) kaj senŝanĝa prezidanto de Varsovia Esperanto-Societo ĝis la invado de Germanio (1939), ĝenerala sekretario de PEA (1947-58), komitatano de UEA (1948-51, 1956-58, 1961-67), prezidanto de ELI (1961-67); aŭtoro de kelkaj lerniloj kaj de libro pri Lidia Zamenhof (1980), kompilinto de la kolekto *Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj* (1970).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 75-76).

3. Antaŭ 75 jaroj mortis **Ernest Archdeacon** (arŝdekóⁿ, 1863-1908-1950), irland-devena franca advokato, inventisto, mecenato, pioniro de aŭtomobilismo kaj aviado, populariganto de tekniko kaj esperantisto; prezidanto de la landa asocio SFPE, poste UFE (1926-45), kunfondinto (kun G. Warnier, 1928) de la mecenata asocio “Domo de Esperanto”; membro de la Lingva Komitato (1932-38); aŭtoro de la ampleksa franclingva verko *Kial mi iĝis esperantisto* (kun antaŭparolo de H. Farman); li ofte gastigis esperantistojn en sia jaĥto “Esperanto”.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 15).

8. Antaŭ 90 jaroj mortis **Louis de Beaufront** (bofróⁿ, Louis Eugène Albert Chevreux, 1855-1888-1935), franca instruisto, esperantisto kaj idisto, nomita “la dua patro de Esperanto” pro la sukcesa disvastigo de Esperanto; fondinto (1898) de la asocio SPPE (poste: SFPE) kaj ties organo *L'Espérantiste*, reprezentanto de Zamenhof ĉe la eldonejo Hachette (1901-03), membro de la Lingva Komitato (1905-08); aŭtoro de pluraj lerniloj kaj prilingvaj libroj, inkluzive de la unua vera gramatiko de Esperanto *Commentaire sur la Grammaire de la Langue Internationale Esperanto* (1900); kompilinto de la antologio *Esperantaj prozaĵoj* (1902); en 1908 forlasis Esperanton kaj aliĝis al Ido, kiun li kunkreis.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 30-31) kaj en la artikolo “Louis de Beaufront, la dua patro de Esperanto” de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2015/03/beaufront>.

12. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Vasilij Jakovleviĉ Jeroŝenko** (Ерошенко, 1890-1910-1952), rusa blinda instruisto, vojaĝanto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Eroŝenko; vojaĝinto per Esperanto tra kelkaj landoj en kiuj li instruis Esperanton, sekretario de Pekina Esperanto-Asocio kaj docento de Pekina Esperanto-Kolegio komence de la 1920aj jaroj; aŭtoro de pluraj verkoj en Esperanto, rusa, japana kaj ĉina lingvoj.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 84-86).

21. Antaŭ dek jaroj mortis **Hans Bakker** (1937-1946-2015), nederlanda organiza konsilisto, socia aktivulo (sekretario de la politika partio Verda Maldekstro, 1989-2002) kaj esperantisto; gvidanto de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO (1965-76), estrarano de Institucio Hodler'68 (1982-88), estrarano de UEA pri financo kaj administrado (1992-95), komisiito de UEA pri la Afrika agado dum pli ol dudek jaroj (1980-2001), estrarano de la landa asocio Esperanto Nederland (1996-2006) kaj kunredaktoro de ĝia revuo *Fen-X* (1996-2011); honora membro de TEJO (1976) kaj UEA (2002), la unua laŭreato de la premio Onisaburo Deguĉi (1987), la Esperantisto de la Jaro 2000 (kun M. La Torre kaj J. Lindstedt).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 22-23).

22. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Kalle Kniivilä** (1965-1982-), finna ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto, loĝanta en Svedio; redaktoro de *Kvinpinto* (1985-86) kaj *TEJO tutmonde* (1993-97), komitatano de UEA (1998-2001), estrarano de UEA pri informado (1998-2001), vicprezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (2008-11); kunfondinto (kun I. Ertl, 2003) kaj redaktoro (2003- , kun paŭzo en 2019 pro laboro en la ministerio pri eksteraj aferoj) de la reta bulteno *Libera Folio*; aŭtoro de ses libroj aperintaj Esperante, finne kaj svede (*Homoj de Putin*, 2014; *Krimeo estas nia*, 2015; *Idoj de la imperio*, 2016; *La Strato de Tanja*, 2017; *La malamiko de Putin*, 2021; *Lando kiu vekigis. Rakontoj el Ukrainio*, 2023).

23. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Louis-Christophe "Ludoviko Kristoforo" Zaleski-Zamenhof** (1925-1934-2019), juda pollanda, poste (de 1959) franca konstruĝeniero, instruisto kaj esperantisto, nepo de Lazarj Markoviĉ "Ludoviko" Zamenhof, filo de Adam Zamenhof kaj Wanda Zamenhof (fraŭline: Frenkel); post sia reaktiviĝo (1987) plurfoja salutanto nome de la Zamenhofa familio en UKoj; honora membro de UEA (1987). Surbaze de interparoloj kun li Roman Dobrzyński verkis la libron *La Zamenhof-strato* (2003), kiu estis tradukita al pluraj lingvoj.

23. Antaŭ 95 jaroj mortis **Hippolyte Seberty** (sebér, 1839-1898-1930), franca generalo, sciencisto kaj esperantisto, la plej proksima kunlaboranto de Zamenhof; prezentinto de Esperanto en la Franca Akademio de Sciencoj (1901); la unua prezidanto de la Organiza Komitato (poste: KKK) fondita en la 1a UK (1905), fondinto kaj gvidanto de Esperantista Centra Oficejo en Parizo, kunfondinto kaj la unua prezidanto de ISAE (1907), fondinto kaj redaktoro (kun G. Chavet) de *Oficiala Gazeto Esperantista* (1908-20), la unua prezidanto de Konstanta Rezentantaro de Naciaj Societoj (1922-23); membro de Lingva Komitato (1905-30), aŭtoro de *Sur l'utilité scientifique d'une langue internationale* (1901), *L'Espéranto et les langues nationales* (1909), *La langue internationale auxiliaire Esperanto* (1910), *L'Espéranto et les sociétés de la Croix-Rouge* (1921) kaj de aliaj libroj kaj broŝuroj.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 251-253).

25. Antaŭ 65 jaroj mortis **Stellan Engholm** (1899-1920-1960), sveda instruisto kaj esperantisto; eldonanto kaj redaktoro de *Malgranda Revuo* (1943-52); aŭtoro de *Al Torento* (1930), *Homoj sur la tero* (1932), *Infanoj en Torento* (vol 1 1934; vol 2 1939), *Maljunulo migras* (1943), *Vivo vokas* (1946), *La lupo sur Kapitolo* (posteume en 1997); tradukinto de sveda beletro, i.a., de tri libroj de S. Lagerlöf (*La mono de sinjoro Arne*, 1933; *Gösta Berling*, 1934; *La ringo de la generalo*, 1938) kaj de *Pasko* de A. Strindberg.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 83-84).

29. Antaŭ 85 jaroj en la koncentrejo Palmiry estis murdita **Adam Zamenhof** (1888-1940), ruslanda, poste pollanda juda oftalmologo kaj esperantisto, filo de Lazarj Markoviĉ "Ludoviko" Zamenhof.

30. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Harold Bolingbroke Mudie** (mjúdi, 1880-1902-1916), angla borsisto kaj esperantisto, fondinto kaj redaktoro de *The Esperantist* (1903-05), vicprezidanto (1908-12) kaj prezidanto (1912-16) de BEA, unu el la tri ĉeforganizantoj de la 3a UK (Kembriĝo, 1907), kunfondinto de UEA (1908) kaj ĝia unua prezidanto ĝis sia morto, membro de la Lingva Komitato (1905-16).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 207-209).

31. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Augusto Casquero de la Cruz** (1945-1969-2023), hispana armeano, instruisto, logopedo kaj esperantisto; internacie konata instruisto de Esperanto kaj turisma organizanto; prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio (2005-08), komitatano A de UEA (2002-06, 2012-13), prezidanto de LKK de la 78a UK (Valencio, 1993), vicprezidanto de Monda Turismo; laŭreato de la internacia premio Ada Fighiera-Sikorska (2004) kaj de la diplomo de UEA pri elstara agado (2011).

Aleksander Korĵenkov



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

Libereco laŭ John Stuart Mill

Jam kiel infano la brita filozofa kaj ekonomikisto John Stuart Mill (1806-1873) estis preparata por *erudicia* agado de sia patro James Mill (1748-1832). En sia aŭtobiografio li rakontas, ke li jam kiel trijarulo komencis lerni la antikvan grekan lingvon. La latina devis atendi ĝis lia oka jaro. Tiam li jam estis leginta, sub la gvido de sia patro, verkojn de Herodoto, Ksenofono, Sokrato, Diogeno, Luciano kaj aliaj. Inter lia oka jaro kaj la dek-dua, li legis multajn latinajn librojn. Lecionoj de lia patro estis parto de la instruado, sed grandparte li studis mem legante, kaj la postan tagon li referis kaj diskutis pri la enhavo dum promenadoj kun la patro, kies sanstato postulis korpan ekzercadon. Mill resumas en sia aŭtobiografio, ke granda peno ja estis uzata por doni al li dum liaj infanjaroj tiom da scio pri la altaj niveloj de edukado, “kiom estas malofte akirita (se entute akirita) antaŭ la viraĝo”. Tio estis grava por lia posta kariero, ĉar li ja ricevis “kvaronjarcentan avantaĝon” super siaj – laŭ li – pli talentaj samaĝuloj.

Aŭtune 1826 lin trafis mensa deprimado, kaj nenio donis al li ĝojon. Li komprenigas, ke la kaŭzo verŝajne estis lia neordinara edukado, “kiu estis kondukata senkonsidere de la eblo de tia fina rezulto”.

Frue la rilato al la patro entenis elementojn de kunlaboro. En 1817 la plurvoluma verko *History of British India* de James Mill estis presata. Dum tiu proceso John kutimis laŭtlegi la manuskripton, kiam la patro korektis la presprovaĵojn. Li diras, ke tiel lia pensado ricevis stimulon kaj gvidon pro la enhavo de “kritiko kaj esploro pri la socio kaj civilizacio en la hindua parto” kaj pri “institucioj kaj agoj de la registaroj en la angla parto”.

Publikiginte la libron, la patro ekokupis postenon en *British East India Company*, kiu praktike efektivigis la britan kolonian regadon de Barato. En 1823 ankaŭ John ekoficis en tiu kompanio, kie li restis ĝis ties dissolvo en 1858. Dum multaj jaroj liaj ofictaskoj ne postulis lian tutan tempon, kaj li povis dediĉi sin al filozofia, politika kaj prisocia verkado.

Li verkis multe, artikolojn kaj librojn. Kiel filozofa li estas precipe konata kiel la ĉefa reprezentanto, kune kun Jeremy Bentham, de la utilismo, skolo kiu konsideris agon etike justa, se ĝi sekvigas feliĉon aŭ plezuron, kaj maljusta se ĝi sekvigas malfeliĉon aŭ suferon, konsiderante ĉiujn influojn. En 1822-23 li fondis kun kelkaj amikoj *Utilitarian Society*. Li publikigis utilisman materialon i.a. en malfrua volumo titolita *Utilitarianism* (1861).

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Katajev estis vampirece avida je koloroj (lia literaturo ĉiam estas aventuro de koloroj). Oni sentas fizikan ĝuon, kiun li ricevis pro la verkado. Li avide ensorbis kaj malavare ŝprucigis kolorojn de l' mondo. Li havis tiel trafan uzadon de la vortoj (samtempe realisman kaj poetikan) kaj tiel precizan majstrecon pri transdono de la aspekto, karaktero, sceno, emocio, ke li dandecce montris sian povon disŝutadi frazojn kaj vortojn <...> La ĝuado de [la verkoj de] Katajev estas eterna printempo. (Sergej Ŝargunov)

Plena, absoluta kaj sentima sendependeco de la pensado

“Jam tiam mi supozis, ke la plej valora trajto de la artisto estas plena, absoluta, sentima sendependeco de sia propra pensado”, – skribis Valentin Katajev en sia lirika aŭtobiografia romaneto “La herbo de l’ forgeso” (1967). La “tiam” estis en jaro 1919, la blankarmeas Odeso.

Valentín Petróvič Katájev (Катаев, 1897-1986), naskiĝis la 16an (Gregorie: la 28an) de januaro 1897 en Odeso, kiu tiam estis la kvara plej granda urbo de Ruslanda Imperio (post Peterburgo, Moskvo kaj Varsovio) kaj la plej vigla kaj bunta inter la Ruslandaj grandurboj: universitato, teatroj, bibliotekoj, legejoj, restoracioj, koncertoj, gazetaro, elektrostacio, telefonstacio ktp – kaj la juna Valenteno povis vidi en la ĉemara urbo ankaŭ la unuajn tramojn, aŭtomobilojn, aviadilojn.

Lia patro, filo de rusortodoksa pastro, Pjotr Katajev (1856-1921) instruis geografion en la Odesa eparĥia porknabina mezlernejo, kaj lia patrino Jevgenija Baĉej (1867-1903), mortinta kiam Vlaĉjo estis nur sesjara, estis filino de generalo. Poste Katajev donis la nomon de la patro kaj la fraŭlinan familinomon de la patrino al Petro Baĉej – la ĉefprotagonisto de sia parte aŭtobiografia romano “Blankadas velo unusola” kaj ties tri postlibroj. (Lia pli juna frato Jevgenij Katajev (1902-1942), pereinta ĉe fronto en 1942, ricevis sian nomon omaĝe al la patrino kaj poste uzis la nomon de la patro kiel la familinomon en sia literatura pseŭdonimo: Jevgenij Petrov).

Danke al la riĉa gepatra biblioteko Valenteno tre multe legis kaj en la naŭjara aĝo komencis skribi en kajero sian “Plenan verkaron”. En 1910 en “Odesskij vestnik” (Heroldo de Odeso, organo de la Odesa filio de Unio de rusa popolo – la notora “Nigra cento”) aperis lia unua presita verko – mallonga poemo “Aŭtuno”. La aŭtoro estis nur 13-jara. En la sama ĵurnalo en 1912 aperis kelkaj liaj humuraj rakontoj, kaj en la sama jaro du rakontoj de la 15-jarulo estis presitaj kiel apartaj libretoj.

Ne fininte la gimnaziajn studojn Katajev volontule aliĝis al la armeo ĉe la fronto kaj pro vundo en 1917 revenis al Odeso kiel oficiro kun du krucoj de S-ta Georgo kaj ordeno de S-ta Anna. La Unuan Mondmiliton sekvis la interna milito en Ruslando, dum kiu la resaniĝinta Katajev unue batalis en la armeo de Skoropadskij (ŝtatestro de Ukrainio, okupita de Germanio), poste aliĝis al la blanka armeo de Denikin kiel artileriisto de kirastrajno, batalante kontraŭ ruĝuloj kaj petluranoj. Komence de 1920 li, malsana je tifo, revenis en Odeson, kiun baldaŭ okupis la

Ruĝa Armeo, kaj partoprenis en konspiro kontraŭ bolŝevistoj. La konspiro estis malsukcesa, sed post kelkaj monatoj en prizono la fratoj Katajev estis liberigitaj preskaŭ mirakle, pli ĝuste: danke al ilia deinfanaĝa amikeco kun Jakov Beljskij el la misfama ĈK (Eksterordinara Komisiono pri batalo kontraŭ kontraŭrevolucio kaj sabotado), kiu ne sciis pri la blankarmeaj servado de Katajev (ĉiuj ceteraj akuzitoj estis mortpafitaj).

En 1922 Katajev ekloĝis en Moskvo kaj vivtenis sin nur per literaturo, ankaŭ dum la Dua Mondmilito – kiel armea ĵurnalisto. En 1955 Katajev iĝis la unua redaktoro de la rapidege populariĝinta revuo “Junostj” (Juneco), kiun li mem iniciatis, kaj dum la sesjara redaktado aperigis plurajn verkojn de junaj aŭtoroj, kiuj ne tute laŭis la partio difinitan stilon kaj enhavon.

Lia verkado evoluis laŭ la tempopaso: satiraj kaj fantastaj verkoj en la jaroj 1920-aj, la kvarlibra serio “La Ondoj de la Nigra Maro” (1936, 1948/1951, 1956, 1961), tipe socrealismaj “La tempo, antaŭen!” kaj “Mi, filo de la laborista popolo” el la 1930aj jaroj, primilita romaneto “La filo de regimento”, porinfanaj fabeloj, inter kiuj elstaras “La sepfolia floro”, dramoj kaj komedioj, kaj lirikaj, sed filozofio-plenaj, aŭtobiografiaj verkoj de la lastaj dudek vivojaroj: “La sankta puto” (1965), “La herbo de l’ forgeso” (1967), “La frakasita vivo, aŭ la Magia korno de Oberono” (1972), “Mia diamanta krono” (1978) kaj “Werther jam verkita” (1979) presita danke al Miĥail Suslov, la ĉiopova sekretario de CK KPSU, malgraŭ la kontraŭstaro de la ĉefo de KGB Jurij Andropov, kiu en 1980 akceptigis malpermeson reeldoni ĉi tiun kontraŭsovetian (li ja malkovris sian blankarmean pasintecon) kaj anti-semitan (li menciis la judajn familinomojn de torturistoj de la Odesa ĈK) verkon.

Kvankam Katajev estis Sovetia verkisto, lia plena sendependeco de la propra pensado, menciita en la unua frazo de ĉi tiu enkonduko, ebligis al li malkaŝe esprimi sian propran opinion, foje tre malkongruan al la partia vidpunkto. Tio ne povis ne kaŭzi al li plurajn malagrablajn momentojn, sed li neniam estis persekutata kaj, aliflanke, li neniam aliĝis al la disidenta movado, nek havis ideon pri elmigro kaj en 1920 ne sekvis sian amikon kaj instruiston Ivan Bunin. Danke al la enorma populareco de siaj verkoj, kiuj estis plurfoje surscenigitaj kaj filmitaj, li estis pli bonstata kaj pli sendependa ol 99% da ceteraj sovetianoj.

Li verkis ne *kontraŭ* aŭ *por* la soveta potenco, sed li pritraktis en la aktuala fono la eternajn temojn: vivon kaj morton, militon kaj pacon, amon kaj solecon. Apartan atenton li donis al infanoj kaj junuloj, kaj tion vi konstatos en tri el la ses noveloj de Katajev, kiujn vi trovos en la sekvaj tridek paĝoj.

Agrablan legadon!

Aleksander Korĵenkov

Valentin Katajev

LA FUSILO

I

Antaŭ ol foriri al la milito¹, subkapitano de la rezervo Perĉenko, levis per la brakoj sian kvinjaran dikvangan filon Ŝurka², forte kisis lian vangon, kovritan per la delikata lanugo kiel persiko.

– Estu saĝa, ne kapricu, ne ĉagrenu la panjon kaj ofte skribu al mi leterojn... Sed plej grave – ne ĉagrenu la panjon. Se vi estos obeema, mi alportos al vi de la milito veran germanan fusilon.

La patra kareso estis nekutima por Ŝurka. Ĝi eldorlotis lin.

Pro la kurte tonditaj lipharoj kaj la razita mentono Ŝurka sentis agrablon kaj tiklon. Li eltiris sian dekstran manon el sub la maniko de la patro, tenere tuŝis la zonon kaj premis sian rondan kapon al la epoleto.

– Ĉu vi vere alportos ĝin?



- Kion?
- La fusilon.
- Ha! Mi nepre alportos ĝin, frateto, estu lojala.

La fervoja stacidomo estis tre brua kaj homplena. Alte, ĝuste sub la plafono, hele lumis du elektraj globoj, kaj ĉiu homo havis du ombrojn. Tio ŝajnis al Ŝurka nekларigebla kaj timiga. Flugis odoroj de pirogoj kaj trovarmigita fero. Estis deziro dormi. Sur la fervoja kajo, apud la trajno, kiu staris lumigita de malforta lumo, kiel fantomo, inter la ordinara publiko amasiĝis multaj armeanoj. Ankaŭ tio ŝajnis timiga. Oni interparolis per mallaŭtaj voĉoj. En la aero pendis peza, senfortiga rumoro.

Iu ploris.

Kiam la patro eniris la vagonon, la vaporlokomotivo abrupte fajfis. Poste la patro vidiĝis en la malfermita fenestro. La patrino levis Ŝurkan per siaj brakoj kaj venis al la fenestro. Li krucosignis kaj kisis ilin de tempo al tempo, kaj Ŝurka sentis, ke la vango de la patro estas malseka. Ankaŭ tio estis timiga, kaj li jam volis ne plori, sed krei. Fine, la vagonoj tiriĝis, laŭvice la bufroj batis unu al la alia, la vagonaj fenestroj kaj vizaĝoj komencis preterkuri, deprime lumigitaj de neverŝajna lumo.

II

De la sekva tago la vivo de Ŝurka daŭris kiel kutime.

Tiel pasis la aŭtuno.

Kutime la patrino dum tutaj tagoj kudris, skribis kaj atendis la poŝtiston. La patro plu ne venis, sed komencis ofte veni leteroj de li. Dufoje dum ĉiu semajno Ŝurka vidis, kiel lia patrino eniris la ĉambron kun letero en la manoj, dum sia paŝado ŝirante la koverton per sia harpinglo. Ŝi rapide trakuris per siaj okuloj la fajne, malrekte skribitajn paĝojn kaj murmuris:

– “Ni plu avancas... kaj jam kutimas al manko de komforto... multe da laboro... ĝis nun ĉio bonas... Mi kisas vin kaj la knabon... skribu”, aha! – “sendu al mi varmajn subvestojn”...

Foj-foje la patrino vizitis la najbarino Guseva. Ankaŭ la edzo de Guseva militis, kaj ambaŭ virinoj pasigis siajn vesperojn en mallaŭtaj konversacioj kaj profundaj suspiroj.

Ŝurka kuŝis en sia lito kun la okuloj duonfermitaj, sed li ne povis tuj ekdormi. Li rigardis en la angulon, kie antaŭ la ikono brulis blua lucerno. Tra la interspaco de la loze ŝlosita pordo enfluis lumo kaj aŭdiĝis ritmaj trankvilaj voĉoj. Ŝurka ne aŭdis la vortojn, sed li estis lulata de monotonaj pliiĝoj kaj malpliiĝoj en la parolado. Iom post iom Ŝurka ekdormis, kaj ofte sonĝis pri la milito. En la sonĝo ĝi estis stranga kaj ne tre timiga kaj interesa. Ofte, krom paĉjo, pafiloj, ĉevaloj kaj buntaj soldatoj, ĝin partoprenis la kortaj amikoj de Ŝurka: Koljka, Gorik kaj Mitejka.

Neofte, kiam Ŝurka kondukis malbone, la patrino memorigis lin pri la germana fusilo.

III

La pluva aŭtuno pasis. Pasis la mildaj neĝaj tagoj de la frua vintro. La Kristnaska festaro pasis en enuo. Fine de la februaro dum noktoj komencis blovi forta malseka vento. Estis du aŭ tri blindigaj sunaj tagoj kun brilantaj flakoj, blua ĉielo kaj sonorantaj paseroj.

Kaj subite, neatendite la patrino ricevis tre malfruintan telegramon, kaj la sekvan tagon venis la patro. Li tre ŝanĝiĝis: lia vizaĝo sunbruniĝis, hardiĝis pro vento, kovriĝis per la nekonata barbo, kaj li parolis per raŭka voĉo.

Hejme komenciĝis tumulto. Konversacioj. Gastoj.

Kvar tagoj pasis nerimarkite, kaj la patro denove malaperis – kvazaŭ li dronus en akvo – kaj apud la lito de Ŝurka aperis granda germana fusilo kaj lakita kasko.

Komence Ŝurka ludis kun la fusilo hejme. Li renversis seĝojn, metis sur ilin la pezan pafilon, kiu devis roli kanonon, kaj laŭte kriis:

– Hura!.. Pa-a-a!.. Paf!..

Poste li kuris en la kuirejon por montri la fusilon al Anjo, kiu rigardis ĝin kun kaŝita teruro.

Fine dum iu mateno la demono de vanteco milde puŝis Ŝurkan kaj konsilis:

“Kial vi ne elportu la fusilon en la korton? Ĉu? Jen kiel miros Koljka, Gorik kaj Mitejka. Eble ili al vi envios! Bone!”

Ŝurka surmetis siajn rufan mantelon, ŝafan ĉapon kun orelumoj, trikitajn pugnogantojn kaj prenis la pezan fusilon sub sian brakon.

IV

La korto estis matene senhoma. Longaj malvarmaj ombroj de la domoj kaj arboj kuŝis sur la rozkolora asfalto. Glaciiĝis la akvo en la ladskatolo, el kiu trinkas la hundoj.

En la korton venis gazetportisto, kiu iĝis magra dum la lasta tempo. Li hastis kaj havis dikan stakon da gazetoj sub sia brako. Ŝurka kure baris lian vojon, celis, klakis per sia lango kaj kriis:

– Hura!.. Pa-a-a!.. Paf!..

La gazetportisto eĉ ne rigardis lin kaj turnis sin en la antaŭan pordon. Tio estas domaĝa.

Denove dum longa tempo neniu aperis. Frosto elpinĉis liajn orelojn. Poste eliris Ĵorĵik Bibin, lernanto de la kvara klaso de la gimnazio, de la tria etaĝo. Li tenis sian oleotukan librosakon kaj, juĝante laŭ lia acida dormema vizaĝo, li denove ne preparis sin al la lecionoj.

– Mi ja havas germanan fusilon. Jes! – Ŝurka diris de malproksime kun afekta indiferenteco.

Ĵorĵik Bibin haltis, interesiĝis.

– Do montru ĝin. Kie vi akiris ĝin? La paĉjo alportis ĝin de la milito, ĉu?

– Jes. De la milito. La paĉjo.

La gimnaziano turnis la fusilon en siaj manoj.

– Montru do kiel ĝi ĉe vi pafas? Jes. Bone. Komprenite.

Ĵorĵik celis kaj klakis.

– Taŭge! Ĉu vi vendas ĝin?

– Kion, ĉu la fusilon?

– La fusilon.

– Vi estas ruza.

– Stultulo, mi donos al vi rublon kontraŭ ĝi.

– Ĉu-u-u? Vere? Donu.

– Kiam mi revenos el la gimnazio, vi ricevos rublon. Atentu, ne vendu ĝin al iu ajn sen mi.

Por Ŝurka rublo estas io tre granda, eksterordinare signifa kaj preskaŭ neatingebla. Nur imagu: sonora peza arĝenta rublo. Kiom da ŝtata potenco estas en ĝia konvekso ĉizajfo! Ŝurka eĉ ne kapablis imagi, kiom da aĵoj eblas aĉeti kontraŭ unu rublo. Lin hipnotis la vorto “rublo” mem. Kaj ĉi tiu vorto en la kvinjara kapeto de Ŝurka staris apud la samaj pezaj, signifoplenaj vortoj kiel “versto”, “barelo”, “jaro”, “maro”, “Ruslando”.

Ne io ajn, sed plena rublo!

V

Poste pri la germana fusilo subite interesiĝis kuiristino de la dua etaĝo, revenanta de la bazaru. Ŝi metis sur la teron sian korbon, el kiu rigardis plata anasa kapo.

– Vidu! Jena pafi-i-lo! Diru, bonaj homoj!

– Jes. Ĝi estas germana. La paĉjo alportis ĝin de la milito.

– Ĉu de la mili-i-to? Vidu! – la kuiristino suspiris kaj aldonis: – Nun oni ĉiujn prenas al la milito. Kaj kiom da homoj pereas pro ĝi.

Ŝi verŝajne rememoris tiun malaltan, variolmarkitan soldaton, kiu estis konsiderata ŝia amato, ĉar ŝi por momento supren levis la okulojn, viŝis larmon per sia montrofringro kun arĝenta ringo kaj kolere kaptis sian korbon de la tero.

Poste en la korton venis granda, malgaja polica strata sentinelo. Li daŭre kaj persiste sonoris al la korta gardisto, kaj ankaŭ li interesiĝis pri la germana fusilo.

– Kion vi havas? Verŝajne, pafarmilon? Ĉu vi havas dokumenton, permesantan porti ĝin? – li ŝercis. – Nu, montru ĝin. Vidu!.. Bonvolu vidi, kia maŝino.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La naĝanto

de Paulo Sérgio Viana



Mi laboras kiel “vivo-savanto”. En mia lando, oni nomas “vivo-savanto” homon, kiu deĵoras ĉe plaĝoj aŭ naĝbasenoj kaj observas la sinbanantojn kaj naĝantojn. Se unu el ili ekdronas aŭ misfartas en la akvo, estas lia tasko savi tiun, elpreni lin el la akvo kaj flegi lin per urĝaj helpoj.

Eble vi pensas, ke tio estas sufiĉe vigla kaj aventureca profesio. Ne por mi. Fakte mi laboras ĉe granda naĝbaseno en urba klubo, kie la akvo ne estas tre profunda, kaj tre malprobable estus, ke homo tie povus droni. Ĝin frekventas tamen naĝantoj ĉiuaĝaj, de etinfanoj ĝis maljunuloj. Geknaboj eklernas naĝadon, gejunuloj sin trejnigas por atleta prepariĝo, virinoj babileme partoprenas grupan enakvan gimnastikadon, maljunuloj naĝas aŭ piediras en la akvo por konservi sian movokapablon. Kaj mi gvatadas ilin, dum miaj okhoraj deĵoroj. Sufiĉe enuige. Mi jam ne memoras la lastan fojon, kiam mi devis helpi iun: sinjorinon, kiu komencis forte tusadi, pro eta torento da akvo, kiu invadis ŝian nazon dum malĝusta spirado.

Tamen, eĉ en plej kvietaj situacioj oni povas travivi kuriozajn aferojn.

Sinjoro Aŭgusto jam frekventis tiun naĝejon antaŭ mia alveno ĉi tien. Li alvenis trifoje en ĉiu semajno, ĉiam tuj post la tagmanĝo, kiam preskaŭ neniu alia homo troviĝis en la akvo. Li estis silentema, sin duŝis, salutis la laboristojn, malrapide naĝis precize dum unu horo, poste li iom piediris en la akvo, tien kaj reen, praktikante profundan spiradon. Sekve, diskrete salutis kaj foriris. Li okupis ĉiam la lastan strion en la naĝbaseno. Lia naĝado estis precize regula kaj egaltakta, kvazaŭ horloĝa. Liaj movoj estis ŝajne milimetre kalkulitaj, li trankvile turnadis sian kapon ambaŭflanke de la trunko. Li preskaŭ ne ŝprucigis akvon dum siaj movoj, prefere li glitadis kiel stranga senskvama fiŝo. Silente, ritme, malrapide.

Dum mia enuiga deĵorado, fine vekis mian atenton la maniero, kiel s-ro Aŭgusto sin movadis en la naĝeja strio, nepre rekte, sen malĝustaj korposkuoj, sen troaj piedaj batoj, per tute ĝustaj rondaj turnoj de la brakoj. Li fakte naĝadis serene kaj elegante, kio ne estas ordinara, se temas pri maljunuloj, kies artikoj jam ne estas tute flekseblaj. Mi venis al la konkludo, ke li praktikas naĝadon de longa tempo.

Ankaŭ lia silentemo kaj diskretemo vekis mian atenton. Urbaj kluboj, kia estas ĉi tiu, celas kontaktigi homojn, kaj ilin ĉeestas personoj interesitaj pri kunvivado kaj interbabilado. Ne tia estis s-ro Aŭgusto. Verŝajne li volis nur la akvon kaj siajn movoblecojn.

Unu tagon, mia enuiĝo atingis tian gradon, ke mi decidis travivi etan aventuron — ne kiel vivo-savanto, sed kiel simpla scivolemulo. Kiam s-ro Aŭgusto per malrapidaj paŝoj eliris el la naĝbaseno, post sia kutima ekzerciĝo, mi venis al li, salutis, kaj petis de li kelkminutan interparolon. Lia reago estis simpatia kaj milda:

— Kompreneble, kara junulo. Mi estas je via dispono.

Mi unue demandis, kiomaĝa li estas. Sepdek kvar. Bone.

— S-ro Aŭgusto, mi observas vian regulan, sanigan kaj teknike bone praktikatan naĝadon. Venis do ideo en mian kapon. Mi volas proponi al vi ion. Eble vi scias, ke en ĉi tiu klubo, unufoje en ĉiu jaro, okazas konkuro de naĝantoj, en ĉiuj aĝogrupoj, de infanoj ĝis altaĝuloj. Nuntempe ni preskaŭ ne havas konkurantojn super la sepdeka aĝojaro. Ni do serĉas eventualajn kandidatojn. Ĉu vi akceptus partopreni naĝkonkuron en la proksima monato, en via kategorio? Tion mi ekpensis, ĉar vi naĝas bele kaj elegante, kaj povos esti motivigo kaj ekzemplo por aliaj estontaj partoprenantoj.

La maljuna homo atente aŭdis min, fikse rigardante per siaj etaj okuloj. Li ne tuj respondis. Li dum momento enpenisiĝis, poste profunde spiris, kaj skizo de rideto desegniĝis sur liaj lipoj. Kaj lia voĉo sonis tre mallaŭte, raŭkete:

— Permesu, ke mi reduŝu kaj revestu min. Poste mi respondos al vi.

Post kelkaj minutoj s-ro Aŭgusto reaperis en kutimaj vestoj, kun tornistro sur la ŝultro, kaj proponis, ke ni sidiĝu dum kelkaj minutoj ĉe la kafejo funkcia apud la naĝejo, en la klubo.

— Permesu, ke mi rakontu al vi fruan epizodon de mia vivo. Ĝi estos nelonga rakonteto. Mi estis dek-tri-jara, kaj loĝis en alia urbo, for de ĉi tie. Tiam mi komencis interesiĝi pri naĝado, same kiel pluraj el miaj amikoj. Simpla amuziĝo. Laŭgrade kiel mi progresis, tiama vivo-savanto, kiu tie deĵoris, invitis min al konkuro kun samaĝuloj — same kie vi ĵus faris. Mi akceptis, sen ia pripenso. Mi sciigis miajn gepatrojn, kaj en la fiksita tago la tuta familio ĉeestis por la sporta festeto. Fiere mi saltis en la akvon kaj fervore naĝis. Mi sentis dum tiuj sekundoj, ke la okuloj de mia patro akompanas min, kaj tio transdonis varman energion. Kun sento de venko mi fine tuŝis la randon de la naĝejo per mia firma mano. Sekve, mi rigardis flanken, kaj konstatis kun preskaŭteruro: mi estis la lasta! Mi rigardis la homojn ĉirkaŭe, kaj vidis mian patron, kiu diskrete ridetis al mi kuraĝige. Finiĝis la premiado, ni revenis hejmen, la tuta familio silentis dumvoje. Nenia komento, nenia konsolo, nenia ŝerco. Mi preme hontis. Ankaŭ poste, nenia aludo al tiu fiasko. En la sama vespero de la konkuro, mia patro invitis min al la kinejo. Ni iris por spekti komikan filmon, kiu tiutempe furoris. Li aĉetis al ni bombonojn, kiel kutime, sen ia preparolo pri la konkuro. Ankaŭ mi ne kuraĝis demandi lin. Vespere, antaŭ ol enlitiĝi, mi iris al li kaj

kun klinita kapo diris: “Pardonu min, paĉo, ke hodiaŭ mi elrevigis kaj hontigis vin...” Li bonkore ridetis per sia aparta maniero, kaj respondis: “Trankviliĝu. Vi ne elrevigis min, ĉar ne tiaj estas miaj revoj. Vi ne hontigis min, ĉar miaj hontoj estas tute aliaj...” Kaj li kisis mian frunton. Tiu sinteno vere kvietigis min, kaj mi bone endormiĝis. Ni ne plu parolis pri tio. Mi forlasis la naĝadon, ne plu frekventis la klubon, neniam aŭdis de iu kolego komenton pri tiu okazaĵo. Pasis la jaroj, kaj mi ofte rememoris ĝin. Kaj tiam okazis kurioza mensa evoluado. Kion mi sentis en tiu momento de malvenko? Certe, honton. Sed laŭgrade kiel la tempo pasis, mi akceptis la ideon, ke ne indas honti. Ne temis pri honto. Mi faris nenian malbonon al iu ajn. Mi nur partoprenis banalan konkuron. Kion signifis tiu “malvenko”? Absolute nenion, same kiel se mi estus venkinta unualoke. Nur ludo. En maljuna aĝo, mi decidis reveni al naĝado. Mi volis perfektigi miajn movojn, mian spiradon, mian rezistemon. Kaj mi rimarkis, ke dum naĝado, se oni plene atentis la movojn, ke ili estu laŭeble plej harmoniaj, tiam oni ne emas pensi pri la signifo de niaj homaj aferoj. Ni nur moviĝas kaj spiras, moviĝadas kaj spiradas. Mi fine lernis, ke naĝado estas taŭga maniero malplenigi la menson je juĝado, je analizado, je taksado. Dum unu horo, trifoje en ĉiu semajno, mi ĉesigas la falsajn pensojn, junulo. Kiam mi finas mian naĝadon, mi foje rememoras mian saĝan, karan patron. Mi sentas min libera, almenaŭ tiom libera, kiom homo povas esti. Tio signifas precize la malon de ia ajn konkurado. Eĉ kun mi mem mi ne konkuras. Ĉu vi komprenas min, junulo? Ne eblas al mi partopreni en via konkuro. Neniam plu mi parolis kun iu ajn persono pri tiu epizodo de mia vivo, ĝis nun. Vi estas la unua, kiu aŭdas ĝin de mi. Mi dankas vin, junulo, ke mi ne plu havas tiun sekreton...

Kaj s-ro Aŭgusto trinkis lastan gluton de sia kafo, adiaŭis, kaj per malrapidaj paŝoj foriris. Kaj mi revenis al mia deĵorado, kiel vivo-savanto. Kurioze, ke nun mia laboro jam ne ŝajnis al mi tiel enuiga.

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO



Tuta biblioteko en unu volumo
Nova eldono korektita kaj ampleksigita
199 verkoj aŭ fragmentoj de 82 aŭtoroj
Kuneldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio
368 paĝoj
Prezo: 27 eŭroj
Aĉetebla ĉe UEA kaj aliaj libroservoj

Nuntempaj hispanaj poetoj el Kantabrio

de Miguel Fernández



Kantabrio (hispane: Cantabria, pron.: Kantabrja), estas unu el la 17 aŭtonomaj regionoj konsistigantaj Hispanion. Ĝi situas ĉe la t. n. Kantabra Maro, ĉe la nordo de Iberio, nome “la duoninsulo, per kiu finiĝas la Eŭropa kontinento, sude de Pireneoj (Hispanio kaj Portugalio)”, laŭ PIV. La ĉefurbo de Kantabrio estas Santander.

Ĉi-regione jam de longe agadas KantEA (Kantabra Esperanto-Asocio), inter kies membroj plej aktivaj kaj brilaj troviĝas la konata Esperanto-kulturulo Miguel Gutiérrez Adúriz, pseŭdonime Liven Dek, verkisto, ano de la t. n. Ibera Skolo, kaj sekretario de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA.

En 2022, KantEA, kun la helpo de HEF (Hispana Esperanto-Federacio), organizis la 80an HEF-Kongreson en la Kantabra urbo Comillas. Unu el la plej aplaŭditaj programeroj konsistis en virtuala (videe realigita de Gutiérrez Aduriz) poezia vespero surbaze de poemdeklamoj en la hispana (faritaj de la propraj aŭtoroj, grupo da Kantabraj gepoetoj) kaj en ilia Esperanta versio, en mia propra traduko, faritaj jen de Ana Manero, jen de mi mem. La pria videaĵo spekteblas ĉe:

<https://youtu.be/ckJ-tCqJcIM?si=SkRNj6iy7Ovz7JSW>

Nun, al la legantoj de *La Ondo*, mi prezentas ok el tiuj gepoetoj kaj po du el iliaj poemoj en mia esperantigo.

MARCOS DíEZ

Marcos Díez naskiĝis en Santander, la ĉefurbo de Kantabrio, en 1976. Ĝis nun li publikigis kvin poemlibrojn, unu fabelkolekton kaj unu antologion de ĵurnal-artikoloj, kaj ricevis tri literaturajn premiojn.

KORPO

Jen mia korpo, loko, la unusola loko.
Sed mia korpo foje povas esti,
transe de sia haŭto,
sama kiel la lumo aŭ kiel la kurento.

Tial,
se mi brakumas vin, mi disvastiĝas.

Tial
mia karno egalas mian domon.

Tial,
se mi min ĵetas en pejzaĝon
tra mia okulparo,
mi estas la pejzaĝo.

Tial,
mergita en la maron,
mia korpo samgrandas
kiel la oceanoj.

BRULADO

Ĉia fajro donas lumon kaj forprenas oksigenon,
trans la fulgo kuŝas la spuro
de lumaĵo.

Ĉia flamo lasas postrestaĵon,
spuron, cindron, kiu bruligas nin.

Eĉ la plej pura amo
ĉe brulado poluas
l' aeron, kiun vi spiras.

Memoru tion, se vi splenda brulos alifoje
meze de incendio,

kaj viafajre prilumu tian certon.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La saĝeco de la Akademio

Clemens J. Setz, aŭstra verkisto kaj simpatianto de Esperanto, rakontas en sia interesa kaj ege kurioza libro *La abeloj kaj la nevidebla* (legu pli pri ĝi en ĉi tiu *Ondo*, p. 125-127) interesan anekdoton:

“Jorge Camacho iam estis demandita, ĉu li havas supozon, pro kio li ankoraŭ ne ricevis la Nobel-premion pri literaturo. Lia respondo: Pro la saĝo de la Sveda Akademio”. (p. 325)

Jes, foje okazas, ke la akademio ja decidas saĝe, kaj 2024 estas tia jaro. Han Kang, verkistino el Koreio, apenaŭ estis konata al mi kaj mia amikaro antaŭ la 10a de oktobro. Ofte ili (kaj mi) opiniis, ke ŝi ja estas karulino de la felietonoj, sed ne tro vaste legata. Do, nun estas bona okazo, konatiĝi kun nova verkistino.



MISAJ PADOJ DE TRADUKOJ

Filmoj el Koreio ofte aperas sur mia horizonto, sed literaturo ne tiom ofte aŭ preskaŭ ne. La problemo estas, interalie, ke ne estas sufiĉe da kompetentaj tradukistoj el la korea lingvo. La unua eksterlanda furoraĵo de Han Kang estis la angla traduko de *La vegetarano*¹. Tiu libro estis ĉie laŭdata, sed rapide montriĝis, ke la tradukintino ne sufiĉe bone regis la korean lingvon. La eldonejo devis poste alkrōi foliojn kun 60 korektoj!

La eraroj de unu tradukanto facile povas multobliĝi, se iu tiel nomata malgranda lingvo uzas tiun version kiel fonton. Tamen la kvalito de la libro evidente brilas tra la lingva herbaĉo.

Sed la tradukisto frontas preskaŭ nesupereblan taskon, se la vortoj en la fonto-lingvo elvokas konotaciojn ĉe la originala leganto. Tiam bona traduko ne estas ofte pli ol ombro, sed kion fari? Eĉ relative simpla frazo kiel: “Mi kredas, ke la fonto devas ne fluigi akvon” povas elvoki pensĉenojn. Tiu frazo estas el la romano *Knabo venas*, en kiu temas pri la subpremo de la demokratia movado en Gŭangĵu² en la jaro 1980a. Tiam estis insurekcio kontraŭ la diktatoro Bak Ĝeong-Hui. La militistoj mortpafis centojn da senarmilaj protestantoj. Poste estis starigita monumento por la buĉitaj viktimoj. La parolanto sentas ironian distancon inter akvo, la simbolo por vivo, kaj la memoro de la morto.³

HISTORIAJ TRAŬMATOJ

La sveda ĵurio pravigis sian decidon pro “ŝia intensa poezia prozo kiu alfrontas historiajn traŭmatojn kaj elmontras la malfortikecon de homa vivo”.

Unu el tiuj traŭmatoj estas la antaŭe menciita masakro en Gŭangĵu. Han Kang priskribas tiun ribelon kontraŭ la diktatoro el kvin malsamaj perspektivoj. En la dua parto la animo de mortinta protestanto observas la alvenon de novaj viktimoj. Ni aŭskultu la voĉon de Han Kang en iom pli longa citaĵo:

La dufoja metala ŝriko de la malfermata kaj fermata metala portalo tratanĉis la silenton de la nokto. La graŭlo de motoro alproksimiĝis. La ĝemela lumstrio de la reflektoroj ekaperis kaj lumigis niajn korpojn. Kiam tiuj lumstrioj arkis super niajn kadavrojn la ombroj siluetitaj de la folioj kaj branĉoj, kvazaŭ kiel nigraj tatuajoj, dancis sur ĉiu vizaĝo.

Ĉi-foje ili estis nur duope. Ili kaptis la membrojn de la novaj kadavroj kaj trenis la lastan ŝarĝon da kadavroj en nian direkton, unu post unu. La kranioj de kvar el ili estis enbatitaj per malakra armilo, kio postlasis ŝprucigan strukturon sur iliaj supraĵ vestaĵoj. Unu el ili portis blustrian hospitalan kitelon. Ili tavoligis ilin en malalta amaso apud la nia, denove en formo de kruco. La kadavro en la hospitala kitelo estis la lasta. Ili kovris lin per pajlosako kaj forrapidis. Mi gapis al iliaj sulkigitaj brovoj, iliaj malplenaj okuloj kaj komprenis, ke post la paso de unu tago niaj korpoj komencis eligi hororan fetoron.

Mi sentis, ke ŝajne ne nur mia, sed ankaŭ ombroj de alies spiritoj proksimiĝis kaj ĉirkaŭis la novajn. El la vestaĵoj de la viroj kun enbatitaj kapoj kaj de la virino ankoraŭ gutetis akveca sango. Estas probable, ke akvo estis jam verŝita super iliaj kapoj, ĉar la vizaĝoj estis tiel klare kiel la mienoj videblas.

LA VEGETARANO

La vegetarano temas pri identeco kaj transformiĝo en korea vestaĵo. La ĝermo de tiu romano venas de verkisto, kiu estas – ŝajne – precipe konata al specialistoj, de Yi Sang kaj ties citaĵo: “Mi kredas, ke homoj devus esti plantoj”. En tiu romano ordinara dommastrino subite decidas, ke ŝi, post koŝmaro, ne plu volas manĝi viandon. Iom post iom ŝi klopodas atingi la idealon de Yi Sang. Ŝi tute evitas animalaĵojn, do ŝi evidente estas veganino.



BLANKO

Blanko estas la simbolo por funebro en multaj orientaj kulturoj kaj por pureco kaj senkulpeco en okcidentaj kulturoj. Kiam la rakontanto de *Blanko* ricevas stipendion por neĝkovrita urbo en Eŭropo, ŝi rememoras la sorton de pli aĝa fratino, kiu mortis tuj post la naskiĝo.

Oni rakontis al mi, ke la unuenaskito de mia patrino mortis kelkajn horojn post la naskiĝo.

Ili diris, ke la vizaĝo de la knabineto estis blanka kiel duonlunforma rizkuko. Ili diris, ke ŝi naskiĝis tro frue, post nur sep monatoj, do la korpo estis delikata, sed la okuloj, la nazo kaj la buŝo estis evidente belaj. Panjo diris, ke ŝi neniam forgesos la momenton, kiam la infaneto malfermis siajn nigrajn okulojn kaj gapis al ŝi.

Tiam mia patrino loĝis izolite en la domo por instruistoj kun mia patro, kiu posteniĝis al bazlernejo en iu kamparo. Estis daŭre sufiĉe da tempo ĝis la nasko, do ŝi estis tute nepreparita kiam subite la amnio rompiĝis iun antaŭtagmezon. Neniu estis ĉirkaŭe. En la vilaĝo estis nur unu telefono kaj ĝi situis en butikoj ĉe la bushaltejo ĉirkaŭ dudek minutojn for. Ankoraŭ restis pli ol ses horoj.

Estis frua vintro, kaj la unua frostoj aperis. Mia 21-jara patrino pene portis ĝis la laborfino de mia patro al la kuirejo kaj boligis la akvon sur la forno kaj sterilizis tondilon. Ŝi serĉis inter la kudraĵoj kaj trovis blankan ŝtofon taŭgan por bebovestaĵo. Dum ŝi luktis kun la naskokonvulsioj, ŝi kudris timigite, kaj la larmoj kuris. Kiam ŝi estis finkudrinta, ŝi trovis tukon kiun ŝi povis uzi kiel vindotukon. Ŝi luktis kontraŭ la naskokonvulsiojn, kiuj daŭre plifortiĝis kaj plioftiĝis.

Finfine ŝi naskis tute sola. Ŝi tondis la umbilikan ŝnuron sole. Ŝi vestis la sangmakulitan korpeton per la vestaĵoj, kiujn ŝi ĵus estis farinta. "Ne mortu, bonvolu ne mortu", – ŝi ade ripetis silente kiam ŝi tenis la infaneton, kiu apenaŭ estis pli granda ol mano. Komence la palpebroj estis dense fermitaj, sed post unu horo ili tamen malfermiĝis. Kiam la nigraj okuloj renkontis ŝian rigardon, ŝi flustris denove: "Ne mortu, bonvolu ne mortu". Post horo la infano mortis. Ŝi kuŝis sur la kuireja planko, premante la mortan infaneton al sia brusto kaj sentante, ke la eta korpo iom post iom malvarmiĝas. La larmoj ne plu fluis.

Mi dankas la Svedan Akademion pro tio, ke ĝi ebligis al mi malkovri la verkojn de Han Kang.

Wolfgang Kirschstein

Notoj

1. La titoloj de ŝiaj verkoj varias en diversaj lingvoj. Mi prenas la titolon, kiun la esperantlingva Vikipedio proponas.
2. La esperantlingva Vikipedio uzas ankaŭ la transliteradon Kŭangĵuo.
3. Jen estas la loko por esprimi mian sinceran dankon al s-ro Shin Hyunkyu (Mondero), kiu kontrolis mian tradukon kaj klarigis al mi kelkajn trajtojn de la korea lingvo kaj kulturo.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



*Gajan Kristnaskon!
Bonan jaron 2025!*

Pli alte, pli rapide, pli forte

Telefonvoko al sportejo:

- Saluton, mi deziras aĉeti abonon, sed ne tre kosten...
- Ĉu vi promesis al iu sportumi ekde nova jaro?
- Jes.
- Ni havas por tiaj okazoj specialan abonon: unu vizito kun kvar belaj fotoj.

- Mi neniam vizitas la sportejon dum lundoj.
- Sed kial?
- Vidu, multaj homoj decidas, ke lunde iili komencos la novan vivon, ne drinkos, ne fumos kaj nepre sportos, do mi venas marde, kiam ilia nova vivo jam finiĝas, kaj la trejnosalono estas preskaŭ malplena.

- Kion vi spektas?
- Konkurson pri levado de pezaĵoj.
- Ĉu inter viroj aŭ virinoj?
- Mi ne komprenis ankoraŭ.

Mi ne bezonas kosten aparaton por scii ke mi marŝis dek mil paŝojn – miaj genuoj anoncas tion rapide.

Virino plendas: “Antaŭ duonjaro mi aĉetis abonon por sportejo kaj ĝis nun maldikiĝis eĉ ne je unu gramo! Morgaŭ mi iros tien persone por demandi, kial ilia servo estas tiom fuŝa...”

Sporta altrangulo klarigas sian malsukceson formi virinan futbalteamon: “Imagu, kie mi trovu 11 virinojn pretajn regule veni al unu loko je la samaj vestoj?!”

- Kion vi povas diri pri nia futbalisto?
- Al mi ŝajnas, ke li tre similas al Dostojevskij.
- Sed Dostojevskij neniam ludis futbalon!
- Tute ĝuste!

Du amikoj interparolas pri la pasinta tago.

- Hieraŭ ni ludis futbalon, kaj mi dufoje golis.
- Bonege. Kaj la rezulto?
- Unu kontraŭ unu.

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Postmorta molusko

... li mortis en ludado... Post 40 jaroj la patro elfosis liajn ostrojn kaj sepultis ilin en la tombo. (*Promenado en Hirosima, la urbo de monumentoj*, Hirosima E-Societo, 2021, p. 45; rimarkis Ionel Onet)

Plej eble varma bondeziro

[... post la operacio li havis serion da problemoj.] Mi deziras al li plej eble bonan sekvon de tiuj problemoj. (Dominique Vasconi-Couturier, 1 dec 2024, grupo uea-membroj)

Ni zumu kaj zumu konstante

Jen tre rezuma filmeto pri la 109a UK. (Paula Adúriz, 10 aŭg 2024, <https://facebook.com/groups/185357291508002/posts/8193164837393834>)

Sklavo de studoj?

Sigitas Parulskis... estas laborigita al la Universitato de Vilno. Li estas poeto... (Karina Scharff. *Poëtische Taalmethode*, [Heeze]: Humble Art, 2022, p. 78.)

Virtuala ursa servo

Eksursoj dum UK 2025 – Mirka Tomečková (Programo de la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto, <https://vk.esperanto.net/2024/programo>; rimarkis Francisco Javier Moleón)

Ĝustatempe

Mi havis la plezuron ekkoni lin ankoraŭ viva antaŭ nur du jaroj... (Seikou, 18 nov 2024, <https://liberafolio.org/2024/11/18/forpasis-claude-gacond/#comment-11490>)

Kvazaŭ adoltoj

La eventon partoprenis ĉirkaŭ tridek plenpreskaj personoj... (*Informacije/Informoj*, 2024, №3, p. 1.)

Tre adolta enhavo

... la Ĝenerala Direktoro povas en individuaj kazoj konsideri kaj apliki malpli altajn kotizojn, laŭ la situacio. (*La Flamo de Esperanto*, 2024, №5, p. 3-4)

Interpunkcia signifo

Valoras viziti la ekspozicion... por pli profunde kompremi la gravecon de eŭropa integriĝo. (*Eksa Eŭropa Unio iam parolis Esperanton*, <https://liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2013/eksa-europa-unio-iam-parolis-esperanton.html>)

Plukis **István Ertl**

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng.
Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, 2014 Capitol Ave. #100, Sacramento, CA 95811. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Ĝi estas demonstra versio de la 140-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>